

V - 19479/38 (1969)

N. 1,3/4-9,12

Bulgara **ESPERANTISTO**



POR ILI:
INTERPRETO -
SED POR LA
POPOLAMASOJ?

1
1969

ENHAVO

Ĥr. Gorov. Semajno de Internacia Amikeco (ĉefartikolo) . . .	1
* * * Lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata en 1968/69 . . .	2
N. Nedelĉeva. Guteto da amo	3
L. Bojaĝieva. La nemezurebla	4
V. Mitev. Respondoj al kvar leteroj	4
M. Vigranovskij. Preludo de la terglobo	5
* * * IX Festivalo de BEJ	6
V. Georgeiv. Esperanto en la Distrikto de Pleven	7
Gr. Kĵosev. Tuturba celebros de 109 a naskiĝtago de Zamenhof en Sofio	8
T. Kurtev. Unu malgranda, sed vigla societo	9
M. Conkovski. Celebro de Nikola Ŝopov	10
* * * La 292-a — el Pollando	11
T. Kulagin. El Sovetunio	12
* * * La nova servo de CED lanĉita	13
* * * UEA aŭspicias novan libron por instruistoj	13
* * * Turista Akademio akceptis Esperanton	13
J. Castel Gil. Dek jarojn Hispana Esperanto-Instituto	14
A. D. Atanasov. Por bona uzado de la Internacia Lingvo . . .	14
Dora Gabe. Avino	15
L. Jevsejeva. Tinko kaj inko	15
D. Motuŝev. Pitoreska angulo de monto Vitoŝa	16

Kovrilpaĝo — de „Esperanto“, № 11/1968

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespondanconcoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Ŝuhova ul. D. 5/7 kv. 44, Moskva, M—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO**

Laŭ decido de UEA dum februaro oni festos Semajnon de Internacia Amikeco. Ĝia devizo estas: „Amikeco trans limoj“. Trans limoj naciaj, rasaj, lingvaj, kulturoj, politikaj kaj religiaj. Ĝia celo: kontribui por firmigo de interkompreniĝo, amikeco kaj paca kunlaboro inter ĉiuj popoloj. Per la Semajno kreiĝos unu bela tradicio, kiu interesigos ankaŭ la eksteran publikon pri Esperanto. Havante antaŭvide la streĉitecon en la mondo, ni des pli bezonas fortiĝon de la persona amikeco trans la limoj. Tio firmigas la tutmondan pacon.

Bulgara Esperantista Asocio subtenas la iniciaton de la Internacia Komitato, en kiu eniras André Bourdeaux, Francio, Frank Helmult, Usono, Erix Carlen, Svedio, kaj la prezidanto de UEA prof. d-ro Ivo Lapenna. La Semajno daŭros de la 16-a ĝis la 22-a de februaro.

Ĝis nun la ideo pri interesperantista amikeco estis praktikata aŭ laŭ iniciato de unuopaj esperantistoj, aŭ laŭ decido de lokaj societoj kaj landaj Esperanto-unuiĝoj. Ekzemple Bulgara Esperantista Asocio dum la lastaj jaroj kelkfoje okupiĝis pri tiu ĉi problemo, detale pridiskutis ĝin dum siaj kongresoj kaj plenkunsidoj de Centra Komitato. Mondpaca Esperantista Movado (MEM), kies prezidanteco estas en nia lando, plene subtenas la ideon kaj laboras por ĝia efektivigo. Ĝi eldonas revuon „Paco“, ĉiun numeron en diversa lando.

Laŭ ni la Semajno de Internacia Amikeco estas iniciato aktuala, utila aj nobla. Ĝi meritas ĉiuf flankan subtenon fare de distriktaj komitatoj de BEA, lokaj societoj kaj unuopaj esperantistoj.

*Iuj skeptikuloj povus subtaksi ĉi tiun iniciaton, argumentante, ke estas preferindaj personaj kontaktoj dum universalaj kongresoj, internaciaj semajnoj, kursoj, festivaloj kaj interrenkontiĝoj. Similajn iniciatojn ni ne subtak-
sas. La personaj kontaktoj estas vere valoraj kaj bonrezultaj. Tamen tiajn internaciajn aranĝojn, kiel la menciitaj, partoprenas negranda nombro de esperantistoj. Ja ĉiu el ni scias, ke granda parto de la verdstelanoj estas homoj kun modestaj enspezoj. Ili ne disponas la necesajn monrimedojn por ĉiujara vojaĝo eksterlanden. Pri tio oni povas konvinkiĝi, tralegante ekzemple la kongreslibrojn de UEA, en kiuj plej ofte figuras unuj kaj samaj familinomoj.*

CK de BEA jam dissendis cirkuleron, per kiu instigas la distriktajn komitatojn kaj lokajn societojn prepari sin por la Semajno de Internacia Amikeco. Bulgara Esperantista Kooperativo ankaŭ aliĝas al la Semajno. Ĝi

eldonos belajn poŝtkartojn, kiujn oni povas uzi por eksterlando. Kompreneble, tiuj ĉi kartoj povus esti uzataj dum la tuta jaro.

Ni rekomendas aranĝi dum la Semajno letervesperojn, kie oni legu fragmentojn el privataj leteroj. Per ilustritaj poŝtkartoj oni povas ornamati verdajn angulojn kaj montrofenestrojn de societaj klubejoj kaj aliloke. Disaŭdigoj pere de radio-retoj, aperigo de materialoj en la gazetaro, disigo de afiŝoj, flugfolioj kaj sloganoj, preparo de murgazetoj k. a. — estas vasta kampo por iniciatoj en ligo kun la Semajno. Rekomendata estas ankaŭ ĝemeligo inter diverslandaj societoj.

Ni esperas, ke bulgaraj esperantistoj kaj precipe la junularo, ĉiuj, kiuj lernis la Lingvon por internaciaj kontaktoj, kaptos la okazon kaj per individuaj aŭ kolektivaj leteroj gajnos novajn amikojn por si kaj por nia pacama popolo.

Ni kredas, ke la unua Semajno de Internacia Amikeco estos sukcesplena kaj ke ĝi por ĉiam restos en la laborplano de UEA kaj de la landaj asocioj.

Vivu la interpopola amikeco! Vivu la paco sur la tuta tero!

LERNEJOJ, EN KIUJ ESPERANTO ESTAS INSTRUATA EN 1968/69

CED entreprenas novan enketon pri la instruado de la Internacia Lingvo en lernejoj en 1968/1969. Tiun gravan taskon, kiun pli frue plenumis por CED s-ro Kennedy, poste s-ro Olle Olsson en la nomo de CED kaj de ILEI, nun transprenis s-ro Helmut Sonnabend. La 19-an de oktobro 1968 okazis en CED konferenco inter la direktoro de CED, s-ro Markarian, kaj s-ro Sonnabend. Dum tiu kunsido oni, interalie, pritraktis la tekston de la nova demando. Oni simpligis ĝin ĝis maksimumo por ebligi, ke absolute ĉiuj geinstruistoj, kiuj instruas la lingvon en tiu ĉi lerneja jaro, povu respondi praktike sen perdo de tempo.

S-ro Sonnabend jam dissendis al la lernejoj, en kiuj, laŭ la antaŭaj statis-

tikoj, la lingvo estis instruata, tiun simplan demandaron, kaj CED insiste petas la geinstruistojn senprokraste respondi kaj resendi la plenigitan demandaron al la adreso: S-ro Helmut Sonnabend, Eckersfeldkamp 11, Dollbergen 3161, Germanio. La geinstruistoj, kiuj ne ricevis la demandaron, bonvolu ĝin peti tuj de s-ro H. Sonnabend.

Necesas, ke la statistiko estu kiel eble piej kompleta, ĉar nur tiamaniere ĝi entute havas sencon. La rezultoj de la enketo estos publikigitaj en formo de statistika trarigardo kiel aparta dokumento de CED. Tiu dokumento estos poste utiligita por la nova klopodo vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj, eventuale per interŝtata konvencio.

OKAZE DE LA NOVA 1969

En la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio kaj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ estas ricevitaj multnombraj salutleteroj kun afablaj bondeziroj pri novaj pli grandaj sukcesoj de la esperantista agado en Bulgario dum la Nova Jaro.

Sincerajn dankojn pri la atento kaj la amikeco!

CK de BEA
Red. Komitato de „BE“



Mi iras sur la stratoj rapidante. Estas malvarme, traflugas neĝo. Tamen ĝi ne estas grandfloka, mola neĝo, kiu varmigas la teron, ĝojigas la koron kaj karesas la okulojn, sed tute era. Kvazaŭ apartaj pecetoj de la aero glaciigas, elŝiras sin el ĝi, kaj la frosta vento ilin disportas.

La homoj, kiujn mi renkontas, ankaŭ rapidas, levinte la kolumojn kaj metinte tukon sur la buŝon.

„Belaĵo estus la vintro, mi pensas, sed se ĝi estus varma“ — kaj apenaŭ mi ne kunpuŝiĝis kun virino, malgranda, eta, portanta bebon, sed tiel pakitan, ke ŝi ĉirkaŭprenas ĝin per ambaŭ manoj por ne ellasi ĝin. Aŭdiĝas sindorlota ploro de la bebo elsub la lankovrilo kaj la patrino balancetas kaj kvietigas ĝin tenere.

Mi haltis, alrigardis ŝin kaj ekpensis: kio igas tiun ĉi virinon porti la malgrandan homon en siaj brakoj?

— Kio povus igi ŝin — respondas iu voĉo en mi, — ŝi ja estas patrino!

— Kaj kio fakte estas patrino? — mi denove demandas.

— Estaĵo, kiu amas — sonis la respondo.

Mi ridetas kaj rigardas la virinon tra la neĝeroj, kiuj kvazaŭ brilantaj punktoj pasas preter mi. Ŝi balancetas la grandan pakajon, pli altan ol ŝi, kaj elsub ĝi ĉiam ankoraŭ aŭdiĝas la dorlotema ploro de la bebo, sed kun silentigantaj notoj.

La virino ĵetis al mi mirplenan rigardon, poste pensis, ke mia rideto rilatas al la bebo, kaj diris:

— Ĝi malsatas kaj tial ploras.

Mi kapjesis facile kaj forpasis pensante en mi: „Kiom saĝa estas la naturo. Ĝi ne uzas admonojn. Ĝi nur metas guteton da amo en la koron de la homo kaj lasas lin. Kaj tiu ĉi guteto faras miraklojn: la patrino zorgas tage

kaj nokte por sia infano, nutras ĝin per sia karno, estas preta oferi ĉion, eĉ sian vivon por ĝi kaj tio donas ĝojon al ŝi.“

Mi entramiĝis, sed la penso pri la guteto da amo ne forlasis min kaj mi pensis: se la naturo volas krei muzikiston, ĝi metas en lian bruston guteton da amo al la muziko. Se ĝi volas krei homon de la scienco, ĝi metas en lin guteton da amo al la scienco. Se ĝi deziras krei heroon, grandan homon, ĝi metas amon en lian koron al lia patrolando, al la socio, al la homaro. Jes, la saĝa naturo faras la minimumon — ĝi metas guteton da amo en la koron de la homo. Kaj ĉio cetera estiĝas per si mem.

Tiel enpensiĝinte, mi ne sentis kiel mi preterpasis la haltejon. Kiam mi ekrigardis tra la trueto, farita per ungo inter la glaciaj floroj sur la vitro, mi tuj stariĝis kaj ekrapidis. Bone, ke ne estis multe da homoj kaj la bonkora tramkondukisto atendis, por ke mi eltramiĝu.

Denove renkontis min la glacia vento per miksitaĵo en ĝi neĝeroj. Sed la penso pri la guteto da amo enportis en min gajan noteton kaj mi volis diri al la malvarmo kaj la frosta vento, ke ili ne estas tiel teruraj, ĉar la naturo povas ankaŭ en ilin meti guteton da amo, kaj tiam la glacia vento aliĝos en varma alblovo, la neĝeroj — en guteto da roso kaj la vintro — en printempo.

Mi atingis la aŭtobusan haltejon kaj jam ne sentis tiel forte la malvarmon. Tie iu frostiganta amikino, frapante siajn ŝuojn unu kontraŭ la alia por varmigi la piedojn, salutis min kaj demandis:

— Ĉu ne estas malvarme al vi? Viaj okuloj ridetas. Pri kio vi pensas, ke vi estas tiel gaja?

(daŭrigo sur p. 5)

LA NEMEZUREBLA

de Ljuba Bojaĝieva

Sur tapiŝo multkolora de l'terglobo,
inter maroj,
kontinentoj,
oceanoj,
kun kaŝita maltrankvilo
kaj sopiro
ame mi malkovras
la mirinde etan
silueton
de Patrujo mia!
Ĝi aspektas kiel makuleto —
nur per unu fingro
mi ĝin povas kovri. . .
Eble oni diros kaj ĝemspiros:
„Plenmanet' da tero,
kaj la mondo estas tiel granda!“
Plenmanet' da tero!
Oni eble pravas. . .
Sed
ĉu por mi ekzistas ie
lando tia,
kie
sub la firmamento blua
pinoj verdaj, sagsimilaj
konturigas sur la altaj
blankaj pintoj de montaroj
pli belege ol la niaj?
Ĉu por mi ekzistas
tia land' alia,
kie
la popola kanto sonas
en la kampoj sunoplenaj
pli belsone ol la nia?
Ĉu per mi ekzistas ie
lando tia,

kie
la tritika greno peze
spikon klinas ĝis la tero
kiel nia?
Ĉu por mi ekzistas ie
lando tia,
kies maro koloriĝas
pli helblue
ol la nia?
Sub ĉi tiu eta
tero-plenmateno
kuŝas tuta jarmillonga
kaj varia
historio nia!
Fruntoporte grunton ĝian
estis akvumintaj
la iamaj prageavoj
kaj per larmoj,
kaj per ŝvito siaj!
En ĉi tiu eta
lando-plenmaneto
kreas la prosperon,
estontecon,
vivon sian
la nuntempaj idoj
de patrujo mia!
Plenmanet' da tero?
Ne, ne estas eble!
La Patrujo kara
estas eĉ nemezurebla,
ĉar mezuras mi ja
vastan spacon ĝian
nur. . . per amo mia,
nur per la fiero
esti ido ĝia!

RESPONDOJ AL KVAR LETEROJ

1. „ . . . Ni militos ĝis tiuj ĉi sovaĝuloj obeeme fleksos la genuojn antaŭ nia armado!“

El letero de usona militestro

Nur jenon al vi diros mi, jankio:
„Genuojn fleksos la popol' de Vjetnamio

nur kiam pafos!“

2. „ . . . Mi konsideras la militon kontraŭ Vjetnamio prava. Kaj nome pro tio mi venis por observi kaj priskribi la bravecon de niaj soldatoj.“

El letero de la usona verkisto John Steinbeck

Jes, multaj venas en la mondon ĝustatempe. al noblaj kaj sublimaj idealoj.
Kaj multaj tuj komprenas sian hommision. Kaj multaj rajte sin ornamas per medaloj.
Kaj multaj jungas siajn mensojn, energion Malmultaj tamen scias morti ĝustatempe.



3. „... Sed kial ni venis ĉi tien? Por mortigi, por ĉesi mortigataj!...”

El letero de usona soldato

La terura
demand'
de Hamleto
ne estas
solvita.

En ĉiu epoko ĝi sonas diversmaniere.
En ĉiu epoko ĝi vekas la homkonsciencon.
„Esti aŭ ne esti!”
Ĉu estu aŭ ne estu
la Vivo
sur nia planedo?!
Ĉu estu aŭ ne estu

la Amo,
la Ĝoj',
la Espero?
Esti aŭ ne esti! —
grandega
kaj tro malfacila
demando.
Kaj ĝia solvado
dependas
ankaŭ de vi,
samlandano de Lincoln!

4. „... Domage nur, ke mi ne sukcesis fini mian studadon en la Universitato”.

El letero de vjetnama junulo-partizano

Ĉi tie ankaŭ estas lecionoj,
ekzercoj,
ekzamenoj —
sukcesaj, malsukcesaj.
Ĉi tie ankaŭ estas severaj
kaj pedantaj
profesoroj.
Kaj la plej severa, nomata DEVO,
senĉese vin demandas,
haltigas,
koleras,
laŭdas,

ordonas,
celdirektas.
Ho, kredu, kara:
tie ĉi —
el la batalo justa —
sukcese faros vi
la ŝtatan ekzamenon
kaj baldaŭ vi ricevos
kiel diplomon
liberigitan patrolandon!

Venelin Miĉev

PRELUDO DE LA TERGLOBO

de Mikola Vingranovskij

Kun oceanoj, kontinentoj kaj markoloj,
kun Sun' ĉe miaj ŝultroj kaj kun Lun' —
mi flugas surŝute de popoloj
kaj en okuloj miaj — Atombomba Fung'.

Jarcento mia! Pompa kaj humila!
De homaj revoj kaj de larmoj konsumant'!
Ho, ne cindriĝu tute, mia Jar' Dumila!
Ne simiĝu, mia kosmonaŭt'!

El ukraina: D. Kolker

— Pri io tute eta — respondis mi, —
pri la malgranda guteto da amo, kiun
la naturo metas en la koron de la
homo.

— Ho, — ekkriis ŝi, — kiel vi povas
pensi pri tiaĵoj en tia malvarmo!
Mi ridetis nur. Vere mi ne sentis
malvarmon.

*Pro aktiva partopreno en la kontraŭfaŝisma batalo kaj en la socialisma konstruado, okaze de sia 60-a jaraĝo estas destingita per alta ordeno k-ino Trajana Spasova Petkova — „9-a de Septembro” 1 grado.
Ni kore gratulas!*

DE BULGARA ESPERANTO-JUNULARO

El la „UNUA OFICIALA BULTENO“

Karaj geamikoj,

Per ĉi tiu nia unua bulteno ni volas informi vin, ke la IX Festivalo de Bulgara Esperanto-Junularo okazos la 5—7-an de aprilo 1969 en la bela suda urbo Haskovo. La Festivalo estas dediĉita al la 25-jara datreveno de la venko de la Socialisma Revolucio en Bulgario.

En la Festivalo rajtas partopreni gejunuloj, membroj de Bulgara Esperanto-Junularo, je aĝo ĝis 30 jaroj. La partopreno de pli aĝaj esperantistoj estos limigita.

Ĉiu partoprenanto laŭ sia aĝo pagas festivalkotizon jene:

Partoprenantoj	ĝis 28. II. 1969	de 1. III. ĝis 20. III. 69
ĝis 14-jara aĝo	1,50 lv.	1,80 lv.
de 15 ĝis 30-jaraĝo	2,00 „	2,50 „
super 30-jara aĝo	3,00 „	5,00 „

En ĉi tiu kotizo por partopreno eniras: festivala broŝuro, insigno kaj aliaj materialoj, festivala karto, per kiu ĉiu festivalano rajtas ĉeesti ĉiujn festivalajn aranĝojn, inkluzive la Printempan Junularan Balon.

La limdatoj estas fatalaj kaj post la 20-a de marto 1969 ne estos akceptataj festivalaj kotizoj. La aliĝado al la festivalo estos ebla nur per grupaj aliĝiloj, subskribitaj kaj stampitaj de la societ-estraj.

La partoprenontoj loĝos en komunloĝejo kaj privataj domoj—por unu nokto — 0.60 lv.

La partoprenontoj manĝos en lernantaj manĝejoj kaj la pago por tag- kaj vespermanĝo estos proksimume 1 levo.

La kotizo por partopreno en la Festivalo estas deviga kaj ne evitebla. La pagoj por loĝado kaj manĝado estas laŭ deziro, sed la Organiza Komitato ne respondecas pri tiuj, kiuj ne faris tiujn pagojn. Sumojn oni sendu ĝis la fiksitaj limdatoj al adreso: ДСК — Хасково, 19/2217, IX фестивал на българската есперантска младеж. En aparta letero oni sendu al la adreso de la Organiza Komitato la grupan aliĝilon kun numero kaj dato de la ĝiro de la sendita mono.

En la Programo de la Festivalo estas antaŭviditaj: solena malfermo kun reprezenta koncerto, konkursaj programoj (en du salonoj — por junpioniroj kaj por gejunuloj), Printempa Junulara Balo, Oratora Konkurso, anonco de la rezultoj de la Literatura Konkurso, Oficiala Fermo kaj premiigo de la gajnintoj, ekskursoj k. a. En la sekvanta Bulteno estas sciigota la Programo de la Festivalo laŭhore kaj laŭloke; same la temoj de la Oratora Konkurso.

Karaj junaj geamikoj, dum la IX Festivalo de BEJ unuafoje estos organizita ankaŭ Literatura Konkurso, kiun rajtas partopreni ĉiu juna esperantisto per originala verko — poeziaĵo aŭ prozaĵo. La temoj de la Literatura Konkurso estas jenaj:

1. 25 jarojn socialisma vivo en nia lando. 2. Esperanto. 3. La junularo kaj la batalo por paco.

La Konkurso estas anonima. Ĉiu partoprenanto en ĝi devas sendi sian verkon en tri ekzempleroj (laŭeble maŝinskribitaj) plej malfrue ĝis 1. III. 1969. En aparta koverto oni devas skribi nomon, naskiĝdaton, profesion kaj adreson. Ĉiujn konkursaĵojn sendu al adreso: IX Festivalo de BEJ, Haskovo, p. k. 73, por la Literatura Konkurso. De la bona diskonigo pri la Literatura Konkurso inter la junaj esperantistoj fare de la societaj estraroj dependas la sukceso de tiu ĉi nova aranĝo en niaj festivaloj.

Ni ne forgesu, ke la Festivalo okazos en la jaro de la glora 25-jara Jubileo de la Socialisma Revolucio en nia lando. Tio devigas nin reprezenti kiel eble plej bone la Bulgaran E-Junularon kaj la bulgaran E-movadon; la Festivalo estu amasa kaj je alta belarta kaj ideo nivelo.

Pri ĉiuspecaj informoj turnu vin al la Organiza Komitato:
Haskovo, p. k. 73, por la Festivalo.

Organiza Komitato



Post la tre bona konferenco de la esperantistoj en Distrikto de Pleven, kiu okazis en marto 1968, la E-movado ĉe ni faris senduban paŝon antaŭen. Tiu konferenco akceptis decidojn pri ĝenerala plibonigo de la E-agado en la Distrikto, pri multigo de la E-societoj kaj E-membraro, plibonigo de E-informado k. a.

Ĝis la konferenco en la Distrikto estis nur 5 E-societoj: en Pleven — 2 kaj en Levski, Nikopol kaj Pordim — po 1. Helpe de la esperantistoj en Pleven estis organizita E-kurso en la kombinumo „S. M. Kirov“ (v. Dolna Mitropolia) kun 15 gekursanoj. La konferenco devigis la membron de la DK Milen Boikliev nepre organizi E-societon post la finiĝo de la kurso kaj tio estis farita: nun en Kombinumo „S. M. Kirov“ agas nova E-societo kun 15 membroj.

La saman taskon la konferenco donis al la membro de DK Georgi Caĉev: fondi novan E-societon en v. Kamenec surbaze de kurso, aranĝita tie helpe de la esperantistoj el Levski. Nun la E-societo en Kamenec havas 13 membrojn. Ĝia prezidanto fariĝis k-do' G. Caĉev, kiu dum la somero finis la inter-

nacian E-kurson en Smoljan kaj nun gvidas E-kurson kun 25 gekursanoj.

La konferenco donis taskon al la membro de DK Todor Janĉev (prezidanto de E-societo en Nikopol) helpi la fondon de nova societo en v. Brest. Tia E-societo estis fondita — kun 25 membroj. Nun ĝi organizis E-kurson kun 13 gekursanoj.

Tiel nur dank' al novfonditaj E-societoj la nombro de la esperantistoj en Pleven-Distrikto plimultiĝis per 50 membroj. Nun la esperantistoj en Pleven klopodas reaktivigi la fervojistan E-societon en la urbo.

En junio DK de BEA organizis renkontiĝon, kiun partoprenis 60 geesperantistoj. Oni analizis la plenumon de la konferencdecidoj kaj starigis novajn taskojn. Al veteranoj kaj meritaj esperantistoj estis disdonitaj la honorinsignoj de CK de BEA.

La distrikta fako „Popola Instruado“ helpe de nia DK sendis k-inon Maria Cenova, instruistino en la gimnazio de v. Trâstenik, al la E-kurso en Smoljan, kie ŝi diplomiĝis. Nun k-ino Cenova instruas fakultative Esperanton en du klasoj de la gimnazio en Trâstenik.

DK daŭre kaj obstine klopodas aranĝi novajn E-kursojn en diversaj loĝlokoj de la Distrikto, utiligante por tiu celo malnovajn esperantistojn. Ekzemple en v. Begleĵ, kie antaŭ kelkaj jaroj agis E-societo, estos gvidataj du kursoj de la longjara esperantisto Stefan Vasiliev: 1 — por instruistoj el la gimnazio, 1 — por ĝelernantoj. Post la finiĝo de la kursoj ekzistos bonaj kondiĉoj por renovigo



de la E-societoj. Novajn societojn oni fondos ankaŭ en urbo Belene, v. Trâstenik kaj aliloke.

En novembro DK de BEA havis kunsidon, dum kiu oni pridiskutis la E-laboron ekde la printempa konferenco ĝis novembro. Estis akceptita plano por plua aktivigo de la agado en ligo kun la antaŭstaranta glora 25-a datreveno de la Socialisma Revolucio en nia patrolando

Venecij Georgiev

prezidanto de DK de BEA—Pleven



Gelernantoj, kiuj sukcese finis elementan E-kurson, kun sia gvidanto G. Cačev — v. Borislav

TUTURBA CELEBRO DE LA 109-A NASKIĜTAGO DE [ZAMENHOF EN SOFIO

Brila, impona celebrazo de la 109-a naskiĝtago de nia kara Majstro estis aranĝita de la Distrikta-Urba Esperanto-Komitato en Sofio.

La salono de la Ŝtata Pupteatro estis plenpleta. Festa atmosfero. Por ni, kelkaj novaj esperantistoj-studentoj, estis speciale interesa nia unua estado en esperantista medio. Ni vidis: estas io kortuŝa kaj kaptanta en la maniero, laŭ kiu la malnovaj geesperantistoj renkontiĝas kaj salutas sin, en tiu ĝoja festspirito, kiu vibras en la aero. Ni sentis kiel la forta amo al Zamenhof kaj lia verko brulas en centoj da koroj kaj ĉiuj ĉirkaŭe aliĝis: indiferentaj ne estas, malĝojaj ne estas, maljunaj ne estas. . .

Sur la scenejo lumas kolora portreto de tiu, kiun ni celebras. Denove kaj denove en niaj animoj regas la ĝuo, kaŭzita de la trajtoj kaj la formoj de tiu ĉi nobla vizaĝo, kiu klare parolas: „Homoj, mi amas vin!“ Girlando de verdaj flagetoj kun la konata stelo trairas diagonale la scenejon kaj ni sentas la ideon per tio esprimitan: la vojo de Esperanto estas vojo supren!

La anoncanto de la programo — la artistino el la Bulgara E-Teatro Belka Beleva, salutis la ĉeestantojn kaj invitis al la scenejo k-don Kunčo Vălev — lektoro de Esperanto en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“. Li raportos pri la vivo kaj la afero de Zamenhof.

Jen eksonas en la salono klara kaj pura parolo. Solfantaĵ pri ĝi, ni absorbas ĉiun vorton, fiksis ĉiun sonon, ĉiun geston. Turnu rigardon: ĉiuflanke homoj profunde atentaj, sur ĉies vizaĝo facila rideto de inspiro kaj plezuro. Ĉiu, kiu konas iomete la socian psikologion, tuj konstato: ĉi tie estas io multe pli granda ol la lingvo mem. Similajn mienojn oni povas vidi nur en koncertaj haloj, kiam sonas la muziko de Šopen, de List, de Bethoven, de Bah. . . Esperanto havas ion similan, specifan,

La raportanto parolas. Ni vidas la junan Ludoviko inspirita de la granda ideo krei lingvon por interkompreniĝo de ĉiuj homoj. Ni vidas lin, jam diplomita kuracisto, transpaŝi la limojn de sia profesio kaj fordoni sin la tuta al sia alta ideo. Ni vidas la senfinajn noktojn de obstina laboro kaj relaboro, de multflanka elprovado kaj genia serĉado kaj. . . fine la belegan verkon, kreitan ne de specialisto-filologo, ne de profesoro aŭ akademiano, sed de ordinara kuracisto.

Iuj asertas, daŭrigas k-do Vălev, ke Esperanto ne povas esti plenvalora lingvo, ĉar ĝi estas artefarita. Sed niaj domoj, vestoj, maŝinoj, verkoj de la arto ktp — ĉu ili ne estas plenvaloraj nur pro tio, ke ili estas artefaritaj? Se la homaro obeus tian logikon, ĝi devus ankoraŭ vivi en grotoj kiel la bestoj. . .

Aliaj demandas: ĉu vere Esperanto estos la internacia lingvo estonte? Ĉu la komuna lingvo ne kreiĝos alimaniere? Al similaj demandantoj ni devas rememorigi la fakton, ke la homoj vivas 50—80—100 jarojn. Kia ĝuste estos la komuna lingvo de la homaro — pri tio zorgos niaj prapranepoj. Ni hodiaŭ povas nur teoriumi pri tio. Sed la fakto restas fakto: ni bezonas internacian lingvon hodiaŭ, nun, tuj — dum ni vivas nian nelongan vivon. Kaj tia lingvo ekzistas: Esperanto! Ĝi estas feliĉo por la homaro, saviĝo elsub la jugo de la multlingveco.

Nesentite la raportanto iĝis oratoro. Lia parolado — akvofalo, lavango. . . La ideoj pri amikeco kaj frateco inter la popoloj, pri paco kaj feliĉo sur la tero inspiris ĉies koron, lumigis ĉies vizaĝon. . .

Post la raporto sur la scenejon aperis samideano Tacuo Hugiimoto el Kioto, kiu varme salutis la ĉeestantojn en la nomo de la esperantistoj el la lando de la leviĝanta suno. Li



Antaŭ kvar jaroj en urbo Marica malmulte da civitanoj sciis ion pri la lingvo Esperanto. Dank' al la helpo de k-do Ĵeko Zaprjanov el Dimitrovgrad, membro de CK de BEA, je la fino de 1964 ni fondis E-societon. Inter la fondintoj nur 3—4 personoj povis paroli ne tre bone en Esperanto. Tuj post tio ni malfermis du kursojn por komencantoj. La sekvin-tan jaron ni aranĝis novajn kursojn, plvastigis nian agadon kaj altiris novajn samideanojn. Nun nia societo nombras 30 membrojn. Jam ni havas bonan klubojn sur



Lecionoj okazas eĉ en la domo de la kursgvidanto T. Kurtev

unu el la centraj stratoj de la urbo. Niaj esperantistoj korespondas kun fremdlando. Ses kamaradoj vizitis siajn E-amikojn en Pollando, Hungario, GDR kaj Ĉeĥoslovakio. La intereso al la Internacia Lingvo plialtiĝis inter niaj geurbanoj.

Okaze de la 25-a datreveno de la Socialisma Revolucio en Bulgario ni penos atingi novajn sukcesojn. Niaj

petis la helpon de la bulgaraj esperantistoj por fondo de internacia muzeo en Kioto. Per sia magnetofono li kunportos nian tutan solenaĵon al Japanujo...

Sekvis la teatraĵeto „Interparolo kun la busto de Zamenhof“ de Emilia Lapenna, prezentita de la Bulgara E-Teatro. Ni emociiĝis, meditis kaj kontente ridis kune kun la artistoj, pro kio ni ege dankas ilin.

Poste la artisto de BET Anani Anev majstre plenumis Esperanto-satiron — fragmenton el „La vagabondo kantas“ de Julio Baghy.

La duan parton de la solena celebro okupis la artistoj el la Ŝtata Pupteatro. Ili brile prezentis al ni la dramigitan tabelon „La ora knabino“. La publiko estis ravita de la spektaklo. Tiujn prezentojn oni devas vidi multloke en nia lando.

Ni disiris hejmen plenplenaĵ de profunda kontento kaj dankemo al la organizantoj de tiu ĉi neforgesebla celebro.

Grigor Kjosev

aktivuloj kiel gekamaradoj Todor Peliĉev, d-ro Gospodin Georgiev, Todorka Dobriŝinova, Atanas Delĉev k.a. faris nemalgrandan laboron — kaj la rezultoj ne malfruis. Nun en nia urbo estas malfermitaj 5 E-kursoj kun 78 gekursanoj, la plimulto — gelernantoj. La estraro de la Societo ĝustatempe certigis la necesajn lernolibrojn, ejojn kaj ĉion, kio estas bezonata. La lecionoj en ĉiuj kursoj marŝas bone.

Ni ne forgesis ankaŭ alian gravan taskon: kolektadon de abonkotizoj por E-periodaĵoj. Laŭ la plano de la DK ni devis kolekti 25 abonojn de „Bulgara Esperantisto“ — ni abonigis 32 samideanojn. Aldone ni abonigis al „Nuntempa Bulgario“ — 2, „Ripozoj“ — 1, „Paco“ — 2.

Todor Kurtev

BULGARA ESPERANTO-MUZEO

Bulgara E-muzeo sciigas, ke pro manko de konvena ejo ĝi provizore ne akceptos librojn, dokumentojn, fotojn kaj aliajn esperantaĵojn.

Adreso: D-ro Boris Nedkov, bul. D. Blagoev 35, Sofio

En novembro 1968 la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ celebris la grandan antifaŝiston kaj esperantiston Nikola Ŝopov, pendigitan de la faŝistoj la 15-an de novembro 1941 j.

En plenplena salono pri Ŝopov parolis k-do Nikola Aleksiev — prezidanto de Bulgara E-Asocio. Li substrekis, ke la fidela popola filo kuraĝe kaj sindone batalis kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo — por nova, justa sociordo. Samtempe li estis aktiva esperantisto — membro kaj sekretario de la Laborista E-Asocio (LEA) en nia lando. Post la invado de la germanaj hitleristoj en

la fratan Sovetunion li partoprenis la unuan sabotgrupon, pro kio la faŝistaj regantoj lin kondamnis al morto.

Emociigan originalan versaĵon pri Nikola Ŝopov legis Asen Grigorov. Trajana Petkova rakontis rememorojn pri li.

En la belarta programo partoprenis artistoj el Bulgara E-Teatro: Belka Beleva, Olga Popova, Miĥail Ĉobanov.

La solenan kunvenon ĉeestis ankaŭ la fratino de Nikola Ŝopov — Donka Ŝopova-Ganovska. Oni donacis al ŝi florbukedon.

M. Conkovski

NOVAJ KURSOJ DE ESPERANTO

Pazarĝik. La aŭtunon de 1968 en la Sindikata domo komenciĝis du kursoj de Esperanto: por komencantoj, gvidata de Svetla Ŝiškova, kaj por progresintoj, gvidata de Rosica Georgieva. En la gimnazio „Konst. Veliĉkov“ gvidas kurson por komencantoj Petko Arnaudov.

La fervora s-ino Stanimira Ŝiškova preparis tre belan vitrinon per siaj E-bildaro kaj E-korespondado.

R. Georgieva

Ŝumen. E-kurso por komencantoj estas gvidata de Atanas Bojaĝiev en la distrikta poŝtejo — Ŝumen.

C. Murgin

Ruse. E-societo „Dimitrovec“ en uzino „Georgi Dimitrov“ malfermis 3 kursojn por komencantoj.

G. Dobrev



La kurso por komencantoj de At. Bojaĝiev en Ŝumen

DANKON DE S-ANO VOLĈIK

Al ĉiuj, kiuj helpis, kiam mi kiel turisto-eksterlandano realigis programon okaze de la Internacia Turista Jaro sub la devizo „Interkonatiĝu kun socialista lando kaj vizitu 100 naciajn turistajn objektojn“, mi tutkore dankas.

S mi plensukcese realigis mian grandegan programon kaj gajnis bronzan, arĝentan kaj du orajn turistajn insignojn, seriozan meriton havas bulgaraj civitanoj, turistaj organizaĵoj, urbaj kaj distriktaj popolaj konsilantaroj, milicejoj kaj esperantistoj.

Por turisto jam neĵuna, krom tio pensiulo-invalido, kiel mi, la menciita entrepreno estis malfacila kaj neordinara. Tamen la cititaj faktoroj rezulte kaj kuraĝige influis min. Ankoraŭfoje multajn dankojn!

Via sindona kaj dankema pola amiko:
Czesław Wolczyk,

merita turisto de Bulgario,
Sosnowiec—Pollando
Skrytka pocztowa 15



Nedelonge en la Sofia Urba Komitato de la Bulgara Turista Asocio okazis kortuŝa solenaĵo: enmanigita estis la 292-a ora insigno „Ekkonu la socialisman Patrolandon!“ Ĝia portanto estas la pola civitano Ĉeslav Volčik el urbo Sosnovec. Per varmaj vortoj la vicprezidanto de UK de BTA Al. Petrov gratulis la unuan alilandonon, ĉirkaŭrintan la cent naciajn turistajn objektojn, enmanigis al li la honoran ateston kaj invitis lin al 20-taga ripozo sur Vitoŝa kiel gasto de la sofiaj turistoj. Antaŭ ol forveturi al montodomo „Tintjava“, la malnova turisto Ĉeslav Volčik gastis en la redakcio de ĵurnalo „Eĥo“.

Sola viziti la 100 naciajn turistajn objektojn kun unu rezervo de bulgaraj vortoj, kiu en serĉado de aŭtobushalt'oj, aliaj transportiloj, lokoj por noktado, vojetoj al montodomoj ŝenĉese pligrandiĝis, estas preskaŭ heroaĵo. Sed kiam kamarado Volčik eniris la redakcion kun energia irmaniero kaj gestoj, kun larĝa slava rideto, kun senĝena familiareco, karakteriza por la veraj turistoj en kiaj ajn cirkonstancoj ili troviĝas, fariĝis tute klare al ni, kiel dum 4 monatoj — du en la pasinta jaro kaj du en tiu ĉi — li sukcesis viziti la 100 objektojn. Evidentiĝis, ke nia gasto bonege parolas Esperanton. Kiel esperantisto li ĉeestis la Universalan E-Kongreson en Bulgario en 1963 jaro, gastis en Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, Nederlando kaj Japanio, sed el ĉiuj landoj plej multe plaĉis al li la klimato de Bulgario.

— Mi estas 55-jaraĝa emerito kun invalidpensio kiel antifaŝisto. Mia sanstato ne estis en ordo, sed la klimato en Bulgario, la varma gastamo de la bulgaroj finkuracis min.

— Kiel vi venis al la ideo viziti la 100 objektojn?

— Dum la tempo de Leipcig-proceso mi estis malliberigita kiel aktivulo de la internacia antifaŝista organizaĵo „Ruĝa Helpe“. La fiero sinteno de Georgi Dimitrov jam tiam sugestis al mi la ideon ekkoni la patrion de tiu fama bulgaro.

Kvankam post tiom da jaroj, mi estas ĝoja, ke mia junula revo efektiviĝis. La vizito de la 100 objektoj mi komencis la pasintan jaron. Mi estis en Ruse kaj en la societo „Prista“ oni donis al mi libreton pri la 100 objektoj: mia intenco estis viziti 25 objektojn por ri-

cevi la bronzan insignon. Sed tiel mi entuziasmiĝis, tiom da interesaj aĵoj mi vidis, ke mi decidis plenumi ĝisfine la komencitan aferon.

La pretiĝo komenciĝis en la komenco de la jaro. Mi apartigis rimedojn de mia pensio, en Varsovio mi aĉetis ĉirkaŭiran bileton por la bulgaraj fervojoj kaj traveturis ĝis fino.

— Kia estas via impresoj pri la objektoj?

— Mi devas diri, ke ili estas bonege elektitaj. La unua parto de ili — historiaj. Honoro estas por la fratoj bulgaraj, por la Partio kaj la Registaro, ke ili sukcesis konservi tiom multe da historiaj, arkitekturaj kaj aliaj monumentoj, kiujn oni utiligas por patriotisma kaj eduka efiko. Multon mi eksciis pri Leviski, Botev, Vazov, Vapcarov, Blagoev, Kolarov, Dimitrov, pri Vela Peeva kaj la partizana movado en via lando. La dua parto de la objektoj estas naturaj rimarkindaĵoj. Jam de 1929 jaro mi estas membro de PTTK kaj kun kelkaj samlernantoj piede ni trairis Pollandon. Do kiel malnova turisto mi povas inde prijuĝi la mirindajn belaĵojn de Bulgario. La tria parto — la socialisma konstruado simple min konsternis. Dum kiom mallonga tempo vi kreis tiajn grandegajn uzinojn, baraĵlojn, elektrocentralojn! Tio nur en la kondiĉoj de la socialismo povas esti atingita.

— Ĉu vi diros ion pri la montodomoj?

— Ĉie oni renkontis min bone. Mi opinias, ke en la monto ne devas esti lukso. Tamen mi ne forgesos montolomojn „Raj“ kaj „Oso-govo“. Multajn renkontiĝojn mi havis kun bulgaraj turistoj: mi regalis ilin per polaj supoj, kaj ili — per turista fazeolo. Ĉe „Oso-govo“ oni min adiaŭis en spaliro. Nur mont-rinte la vojon tre malproksime antaŭen, oni adiaŭis kun mi ĉe la montodomoj.

— Kaj kia estas via bilanco de la vojaĝo?

— Bonega! Sed tute ne estis facile. Okazis iufoje, ke mi pretervadis iun objekton kaj poste devis reveni. Sed krom tio, ke mi sukcesis travojaĝi fratan Bulgarijon, la plej grava estas, ke mi fizike kaj psike fortikiĝis, ekkonis vian popolon, kiu ĉiam min allogis per sia slava varmeco kaj senkompari gustameco. Bulgario por mi estas jam dua patrujo.

„Eĥo“, 11. X. 1968

El la bulgara: V. Vasileva

Esperantisto, kiu ne laboras por la disvastigo de nia lingvo, similas al persono, kiu posedas bonegan telefonaparaton, sed kiu sola en sia urbo havas tian aparaton kaj ne klopodas, por ke la aliaj ankaŭ havigu al si telefonilon.

Karlo Bourlet



CELEBRO DE TURGENEV

GASTOJ DE MOSKVAJ ESPERANTISTOJ

La aŭtuno de 1968 j. en Moskvo estis tre abunda je eksterlandaj gastoj-esperantistoj. Nin vizitis la fama franca esperantisto Viktor Lebreŭ — fama sekretario de la granda rusa verkisto Lev Tolstoj. Spite al sia sufiĉe maljuna aĝo (86 j.), li estas eniunde sana, vigla, laborkapabla kaj tre interesa homo.

S-no Lebreŭ venis Sovetunion laŭ invito de Tolstojmuzeo-Rezervejo en Jasnaja Poljana, kien li venigis multajn aŭtentikajn materialojn, kunligitajn kun la vivo de L. Tolstoj.

Dum sia pli ol trimonata estado en Sovetunio s-no V. Lebreŭ parolis antaŭ Moskva Radio kaj Televido kaj multfoje vizitis esperantistajn kunvenojn, kie li detale kaj interese rakontis pri la novaj kaj malnovaj tempoj.

S-no Lebreŭ estis unuanime elektita kiel honora membro de Moskva Internacia Esperanto Klubo (MIEK). La klubanoj donacis al li memore la verkon de Lenin „Tolstoj kiel spegulo de la rusa revolucio“ kun deca versa surskribo.

Ankaŭ aliaj geesperantistoj nin vizitis: s-no I. A. Popov el Kanado, s-no Szöke Laslo el Hungario, s-ino Winfred Johfor el Anglio, s-no Tibor Sekelj el Jugoslavio — revene el Japanio, grupo de polaj gejunuloj-turistoj, s-inoj Ĥr. Benovski kaj Petko Bonev el Bulgario k. a.

La 10-an de novembro en MIEK estis organizita literatura vespero, dediĉita al 150-a datreveno de la naskiĝo de la fama rusa verkisto I. S. Turĝenev, kies tradukitaj en Esperanto verkoj estas konataj inter la esperantistoj en la tuta mondo.

Vastan kaj detalan raporton pri la verkado de Turĝenev faris s-ino V. N. Lozinskaja. Aldone al ŝia raporto prof. E. A. Bokarev detale analizis la tradukitajn verkojn kaj menciis iliajn datojn kaj eldonojn en Esperanto.

Fino Tanja Loskutova el Ivanovo sufiĉe interese rakontis pri sia partopreno en turista vojaĝo al Bratislava kaj banurbo Krištjani (Ĉeĥoslovakio), kie estis organizitaj viglaj esperantistaj ludoj, amuzoj, ekskursoj, dancoj ktp.

Post la oficiala parto de tiu ĉi vespero okazis legado de verkoj, dediĉitaj al Turĝenev, ankaŭ liaj verkoj, en kiu partoprenis A. S. Tonti. A. K. Malm.

METODOJ DE ESPERANTO-INSTRUADO

La 24-an de novembro okazis erudicia raporto de prof. E. A. Bokarev pri metodoj de E-instruado kun demonstrado de apartaj metodikaj lernolibroj, eldonitaj en diversaj landoj. Rezulte de tiu interesa raporto oni decidis estontjare organizi serion de lekcioj pri metodoj de E-instruado kaj renovigi la agadon de metodika komisiono ĉe la Moskva Domo de la Instruistoj.

Poste sekvis funebra informo pri la forpaso de fama soveta esperantisto Joganson Zilberfarb (1901—1968) — arda talento de kleriga agado, lingvoscienco kaj fama tradukinto esperanten de la senmorta himno „Internacio“.

PRI LA LIBRO DE SVADOST

La 1-an de decembro en MIEK dum vespero de Esperanta Tribuno estis pridiskutita ruslingva libro de E. Svadost — „Kiel ekestos komuna lingvo?“, kiu enhavas ankaŭ kontraŭesperantajn eldirojn. Oni kritikis la malpravecon de la aŭtoro. En la kritikaj paroloj partoprenis: I. Kuriĉ, S. Krajnov, E. Salnikov, A. Harkovskij, E. Bokarev k. a.



Precize ĝustatempe por la 20-a datreveno de la subskribo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la 10-an de decembro, aperis en Hago la unua numero de la nova plurlingva revuo sub aŭspicio de CED — „La Monda Lingvo-Problemo“. La unua kajero enhavas artikolojn pri la lingva problemo en la lingvoj angla, franca kaj germana, kaj krome aperigas aktualajn Notojn en la itala kaj hispana.

La nova revuo aperas ĉe la konata internacia eldonejo Mouton & K-io (Hago-Parizo), kiu havas altan reputacion kiel eldonejo de soci-sciencaj (precipe lingvistikaj) libroj kaj revuoj. Aŭspicias ĝin la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvo-problemo (London-Rotterdam) — institucio, kiun kreis UEA. En ĝia redakta komitato troviĝas monde konataj fakuloj de lingvistiko, juro, psikologio, antropologio kaj aliaj sociaj sciencoj: la profesoroj Paul Ariste kaj E. A. Bokarev (Sovetunio), Ivo Lapenna (Britujo), Eugen Wüster (Aŭstrio), A. Capell (Aŭstralio), Géza Bárczi (Hungario), G. Waringhien (Francio),

C. J. Adcock (Nov-Zelando), Z. Klemensiewicz (Pollando), B. Migliorini (Italio), Vl. Georgiev (Bulgario), C. C. Berg (Nederlando) kaj Mario Pei (Usono).

La esenca rolo de „La Monda Lingvo-Problemo“ estas: vekti atenton kaj interesiĝon pri la lingva problemo en tiuj medioj de scienco, administrado, edukado, industrio kaj politiko, kies decidoj pri lingvo-uzado estas devige gravaj por la lingvo-uzo de tutaj popoloj, de la socio ĝenerale. La enhavo de la revuo rilatos unuavice al la *problemo*. Ne en ĉiu artikolo troviĝos diskuto pri *solvo*. Sed eĉ tie, kie ne estas mencio pri la Internacia Lingvo, tamen diskrete pledos por ĝi la fakto, ke post ĉiu artikolo nacilingva aperos ampleksa resumo en Esperanto. Tiuj samaj resumoj en Esperanto ebligas, kompreneble, ke ĉiu leganto, kiu komprenas la Internacian Lingvon, povos ĉerpi el la revuo la esencon de ĝia enhavo ankaŭ sen ia scio de la koncernaj lingvoj, en kiuj aperas la artikoloj mem.

UEA AŬSPICIAS NOVAN LIBRON POR INSTRUISTOJ

Post nelonge aperos en Jugoslavio nova libro, kiu faros grandan kontribuon al la instruado de la Internacia Lingvo. Temas pri „Metodiko de la Esperanto-instruado“ de prof. Rudolf Rakuša. Instruistoj de Esperanto jam delonge tre bezonas ĝeneralan manlibron, kiu helpas al ili fari la instruadon kiel eble plej efika. Kvankam la verko de prof. Rakuša jam de longe estas tute preta por presado, ĝis nun ne estis eble eldoni ĝin. Fine tion ebligis UEA, kiu donas al la eldono sian aŭspicion kaj financon helpon. La libro

aperos en 2000 ekzempleroj ĉe la eldonejo Mladinska Knjiga kaj ĝi certe fariĝos ŝatata kunulo de ĉiu Esperanto-instruisto.

Informa Servo de UEA, 5/68

TURISTA AKADEMIO AKCEPTIS ESPERANTON

La Internacia Akademio de Turismo unuanime akceptis Esperanton por sia internacia „Vortaro de Turismo“ kaj decidis, ke laboru sub la prezido de d-ro Hj. Unger (Zürich) malgranda lingva komisiono, kiu preparos la Esperanto-tradukojn por tiu faka vortaro. Poste tiun decidon konfirmis — same unuanime — la ĝenerala asembleo.

Ĉi-jare Hispana Esperanto-Instituto festas sian 10-an datrevenon. Leĝe fondita en 1958 sub la nomo „Instituto de Esperanto“, ĝi estis kreita kun la celo reprezenti leĝe antaŭ la aŭtoritatoj la geesperantistojn de Barcelono. Tamen la flugiloj de la aglido kreskis kaj bezonis pli altajn kaj largajn spacojn por atingi plej diversajn tavolojn kaj agadkampojn. Sed ĉio ĉi postulis turniĝon. Tial en 1963 la barcelona instituto fariĝis tutlanda organizo sub la nomo „Hispana Esperanto-Instituto“ (HEI). La saman jaron HEI organizis la

24-an hispanan kongreson de Esperanto en Barcelono, kies ĉeesto — 515 kongresanoj — estis tute neofta. Sub la prezidanteco de d-ro Fermín de Urmeneta y de Cervera, doktoro pri juro, filozolio kaj beletro, Hispana Esperanto-Instituto funkcias nuntempe laŭ la linio de moderna kultura entrepreno, kiu sen bruo, sed kun efikeco klopodas por enkonduki Esperanton en la praktikan vivon de sia lando.

Jorge Castel Gil
sekretario de HEI, Apartado 2428,
Barcelona

LINGVAJ DEMANDOJ

En unu paŭzo dum la 37 Bulgara E-Kongreso samideano Metodij Popov (prezidanto de la E-Societo en Kjustendil) alparolis min pri lingvaj eraroj, faritaj de kelkaj partoprenintoj en la diskutoj, kaj sugestis al mi preni la parolon en la plua kunsido kaj atenti pri la rimarkitaj nekorektaj uzoj. Mi trovis, ke enmikso de lingvaj demandoj en aferajn diskutojn estas nekonvena kaj li aliigis sian proponon en senco, ke tamen almenaŭ per „Bulgara Esperantisto“ estu farataj avertoj pri nepermesablaj devioj de la bona, korekta Esperanto. Mi komprenas la indignon de tiu ĉi klera esperantisto kaj penos plenumi lian peton laŭ mia eblo.

Mi povas montri erarojn, kiujn mi konstatis en mia komunikado kun bulgaraj esperantistoj kaj kiuj estas pli oftaj, eĉ, en iu grado, tipaj. Probable ankaŭ aliaj samideanoj, precipe instruantoj de Esperanto, havis okazon observi la uzadon de la lingvo kaj rimarki tipajn deviojn. Estus utile, se tiaj samideanoj sciigos pri siaj konstatoj.

La eraroj ordinare koncernas elparolon, uzon de vortoj en neĝusta senco kaj nebonan konstruadon de frazoj — peko kontraŭ la sintakso.

Unue mi atentigos pri eraroj en la
AKCENTO
rimarkataj kelkfoje eĉ en parolado de cetere tre bonaj esperantistoj. Ne temas pri neĝusta akcentado de vortoj, finiĝantaj je *io* kaj *oro* (nacio, porcio, di-

POR BONA UZADO DE LA INTERNACIA LINGVO

rektoro, profesoro k. s.); ĉe ili la eraroj rapide foriĝas. Sed jen kiaj okazoj estas konstatataj:

ĉe *ordaj numeraloj*: *unu*a, *dudeka* k. s. La parolanto estas sub influo de la elparolo de la nombraj numeraloj *unu*, *dudek* kaj preteratentas, ke formante ordan numeralon ni almetas la finaĵon *a*, per kio la silaboj plimultiĝas kaj la antaŭlasta silabo jam iras al nova loko: *unua*, *dudeka* ktp.

Ĉe iuj el la *korelativaj vortoj*: *kiām*, *tiām*, *ĉiām*, *kiòm*, *tiòm*, k. s. Verŝajne tie ĉi influas la adjektivaj formoj *kiāma*, *kiōma* ktp. Oni do iras laŭ fluo de erara ekkutimiĝo, ne konsiderante kiu estas antaŭlasta silabo en *kiāma* kaj kiu — en *kiam*.

Estas rimarkitaj ankaŭ akcentoj: *hòdiaŭ* (anstataŭ *hodiaŭ*), *apùd* (anst. *apud*) kaj — plej ofte: *malpli*, *malplej*. Klarigon pri la kialo de la lasta erara uzo ni povas trovi en tio, ke en la lingvoj, kiuj formas la komparacion simile al Esperanto — per apartaj partikuloj (kiel estas ekz. en la bulgara kaj en la franca), la partikulo portas logikan, kaj sekve de ĝi ankaŭ dinamikan akcenton: *пò-силен*, *на̀й-умен* (la adjektivoj fakte perdas sian akcenton). Sub tiu ĉi influo la uzantoj emfazas akcente *pli*, *plej* (neglektante, ke en la nova kombino ili restas lasta silabo) kaj ne *mal*, kiu ja aperas kiel antaŭlasta silabo kaj devas ricevi la akcenton.

A. D. Atanasov

POR LA MALGRANDAJ ESPERANTISTOJ

AVINO

de Dora Gabe

Panjo diras, ke avino
estis eta kaj petola;
kiam estis ŝi infano,
vesti sin ne povis sola.

Ke ŝi havis harplektaĵon,
estis en mallonga jupo
kaj kun plúmó kaj kajero
iris al lerneĵokupo.

Dio, kiel amuzege:
tiu ĉi avin' maljuna,
kiu okulvitrojn portas
kaj riproĉas, kaj murmuras —
kun kajero kaj jupeto!
Kara, dolĉa avinetó!

El bulgara: *Asen Grigorov*

LA SAĜA STURNO

Sturno volis trinki akvon el botelo,
sed per la mallonga beketo ne povis
atingi ĝin. Ĝi pikis la vitron, sed ne
povis rompi la botelon. Ankaŭ ne po-
vis renversi ĝin, ĉar por tio ĝi estis
tre malforta.

Tiam la sturno serĉis multajn ŝtone-
tojn kaj ĵ-tis ilin en la botelon. La
akvo leviĝis tiom alten, ke la saĝa birdo
povis atingi ĝin per la beko kaj ne plu
soifis.

TRI MUSOJ

Iu reĝo vidis foje en sonĝo tri mu-
sojn: unu grasa, alia malgrasa kaj la
tria — blinda.

Maltrankvila pri la signifo de tiu
stranga sonĝo, li venigis diveniston,
rakontis al li la sonĝon kaj demandis
pri klarigo.

— Via reĝa moŝto, — respondis la
divenisto, — la sonĝo ne estas tre
malklara. Vi vidis en sonĝo la staton
de la aferoj en via regno. La grasa
muso estas via ministraro. La malgrasa
estas via popolo. Kaj la blinda — tio
estas via reĝa moŝto mem!

ETA RIMAJO

En la domo
estas homo,
li alvenis ĵus el Romo. . .
Laŭ diplomo —
astronomo,
sed disputas pri atomo. . .

TINKO KAJ INKO

de Ljudmila Jevsejeva

Eksidinte palas Tinko —
englutita estas inko.

— Min embuskas mortatako
pro la inko en stomako. . .

Kion fari? Diru veron!

— Tuj englutu sorbpaperon.

PRESERAROJ

Ofte la kamparanoj iris en la arbon
por havigi al si novajn vostoĵojn kaj
kapojn.

La indiĝenoj kutime kaptas leonon
per peto.

Blankaj flosoj falis de la vintra ĉielo.

En la interno de Azio troviĝas mul-
taj altaĵoj plenaj de fokoj.

La plando de la dancejo estis tre
glata.

KIEL KAPTI DU LEONOJN?

— Ĉu vi scias, kiel oni povus kapti
du leonojn en Afriko?

— ???

— Tre simple. Oni kaptas tri kaj
poste liberigas unu.

EN LA ZOOPARKO

Onklo Mateo akompanas Miĉjon en
zooparko. El la baseno foko elmontras
sian dikan, lipharozan kapon, kun oku-
loj en graso enprofundiĝintaj.

— Oĉjo, jen la foko similas al vi!

— Ne krii tiel forte, Miĉjo.

— Kial do? Ja la foko ne kompre-
nas Esperanton!

El rumana: *Adrian Boldan*

Съвременните международни връзки и широкият културен и стопански обмен на нашата страна с други държави, както и ускореното развитие на окръга като интересен туристически обект, налагат необходимостта да се изучават в училищата най-различни чужди езици.

Между тези възможности изучаването на международния език Есперанто е едно благоприятно и полезно мероприятие. Езикът есперанто има много опростена граматика, богат речников фонд и логическо устройство на фразата, които го правят лесно усвоим.

Във всички страни по света есперанто се изучава и ползува. У нас също се изучава в много училища, като в Софийския държавен университет има открита катедра.

За изучаването на есперанто в училищата Министерството на народната просвета е изготвило специална програма.

Във връзка с горното отделът препоръчва на директорите на училищата:

1. Там, където има възможност, да се открият кръжоци или да се въведе факултативно изучаването на есперанто.

2. Да се съдействува за включването на учаци се и учители в изучаване на езика есперанто.

За повече подробности и за набавянето на учебници по есперанто се отнасяйте до Окръжния комитет на Българския есперантски съюз в гр. Благоевград.

Н-К ОТДЕЛ НАР. ПРОСВЕТА: (п) Г. Стоянов

ĉarma lando

Vitoŝa, kiu leviĝas apud Sofio kaj estas oftege vizitata de la bulgaraj turistoj, fariĝas ankaŭ centro de internacia altmonta turismo. En ĝiaj sudaj deklivoj, ĉe la limoj inter la arbarzono kaj la majestaj rokegoj, elkreskas la sport-turisma komplekso „Aleko“. Iam ĉi tie renkontis skiistojn kaj turistojn montodomo „Aleko“, kiu tamen montrigis nesufiĉa, tial oni pligrandigis kaj modernigis ĝin. Nun montgastigon donas ankaŭ la nova hotelo-restoracio „Ŝtastliveca“, nomita al la kreinto de la organizita turista movado en Bulgario — la senmorta aŭtoro de „Baj Ganju“ — Aleko Konstantinov (kun pseŭdonimo „Ŝtastliveca“ — „La Felĉulo“).

La hotelo troviĝas je alteco de 1860 m, en la sudorientaj deklivoj de la monto, kie eterne verda konifera arbaro puri-

PITORESKA ANGULO DE MONTA VITOŜA

gas kaj freŝigas la aeron. Ĝi estas ligita kun Sofio per bona panorama vojo.

La hotelo estas sesetaĝa kun 250 litoj, bonege aranĝita. La turistoj povas lui litojn en ĉambroj kun 1, 2 aŭ 4 litoj, kun apartaj aŭ komunaj duŝoj k. a.

Helpe al la turistoj funkcias oficejoj por informoj kaj ŝanĝoj de valuto, razejo, stando por vendado de memoraĵoj kaj poŝtkartoj, ludsalonoj, poŝtejo ktp.

La restoracio de la hotelo posedas 450 sidlokojn kun 2 bankedsalonoj en nacia stilo. Tie ĉi oni povas manĝi bongustajn, popolmaniere faritajn manĝaĵojn. Bela folklora muziko distras la gastojn.

La hotelo kaj restoracio renkontas vizitantojn dum la tuta jaro. Ĉiu sezono proponas sian specifan variecon. Vintre la skiistoj trovas bonegajn kondiĉojn por ripozo kaj sporto. Je ilia dispo estas taŭgaj terenoj kaj skisaltejoj, du

skiliftoj kaj unu skitirilo. La lastaj helpas ilin venki la altaĵon revene supren. La proksimeco de la plej alta pinto de Vitoŝa „Ĉerni Vrah“ (2285 m) kaj la roko de „Reznjovete“ konservas la neĝon ĝis malfrua printempo. Tio ebligas multajn internaciajn kaj lokajn skikonkuradojn.

Se la esperantistoj, bulgaraj kaj eksterlandaj, bezonas pliajn informojn pri la kondiĉoj de restado en „Ŝtastliveca“ aŭ kiajn ajn turistajn informojn, ili povas sin adresi al la Komisiono pri Turismo ĉe Bulgara Esperantista Asocio, p. k 45 — Sofia.

D. Motuŝev



ВАЖНО СЪОБЩЕНИЕ

Редакцията на „Enciklopedio de Esperanto“ се нуждас срочно от следните издания на Българския есперантски съюз:

1. „Internacia Kulturo“

1945 г. — броевете за септември и ноември—декември; 1946 г. — цялата годишнина; 1947 г. — цялата годишнина без броевете за септември и октомври; 1948 г. — цялата годишнина без броя за октомври; 1949 г. — втората половина на годишнината от юли до края включително.

2. „Nuntempa Bulgario“

1961 г. — бр. 6; 1963 г. — бр. 10; 1964 г. — бр. 10 и таблицата със съдържанието на течението за 1964 г.; 1967 г. — бр. 6 и 9;

Които притежават исканите годишнини и броеве, нека веднага се обадят в редакцията на „БЕ“ и съобщат своите условия.

Ĉefredaktoro: Kunĉo VALEV

Redakta komitato: Tatjana EVSTRATIEVA, Atanas LAKOV, Venelin MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV, Petr TODOROV.

Korektis: V. Petrova Sofia, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

En la jenaj libroj diversmotive oni parolas ankaŭ pri Esperanto kaj la Esperantaj organizaĵoj ĉe ni:

„Rememoroj“ de generalo-majoro Petr Vranĉev, Ŝtata Militeldonejo, Sofio, 1968, p. 246.

„D. Blagoev, G. Kirkov, G. Bakalov, D. I. Poljanov en rememoroj de siaj samtempuloj“, libroeldonejo „Bulgara Verkisto“, Sofio, 1968, p. 360, 472.

„Juneco nia“ — notoj el la kontraŭfaŝisma batalo — de Georgi Panĉev, libroeldonejo de Bulgara Komunista Partio, Sofio, 1964, p. 289, 313, 318.

En ĵ. „Dimitrovec“, Uzino „G. Dimitrov“ — Ruse (20. IX. 1968): raportaĵo „Esperanto-Ekspozicio“ de Iv. Daskalov — pri ekspozicio, aranĝita de E-Societo „Dimitrovec“ en la sama uzino.

En ĵ. „Oteĉestven Zov“ — Vraca (12. X. 1968) materialo „Verda Raketo“ de D. Boĉev — pri la agado de Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en Vraca.

En ĵ. „Naroden Drugar“ — Jambol (24. X. 1968): rakonto „Drinkulo“ de hispana esperantistino Maria Rosa Sich el Barcelono, tradukita en E-ton de Dimo Trudoljubov.

En la sama ĵurnalo (9. XI. 1968): informo de Konst. Kavârĝikov pri honorigo de la maljuna E-veterano Penko Petrov per diplomo de CK de BEA pro lia partopreno en la filatela ekspozicio en Varna dum la 37-a Kongreso de BEA kaj 20-a Jubilea Kongreso de IFEF.

Gazeto „Lekcia Propagando“, eldonaĵo de Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto, Sofio (n-ro 10—11, 1968): du artikoloj de Atanas Baĉev. En la unua — „Per parolo kaj ekzemplo“ — pri la revoluciulo-komunisto Stefan Nikolov el Karnobat, la aŭtoro diras: „En la abstinencula kaj esperantista societoj... ĉie estis aŭdebla la parolo de la Partio“. En la dua artikolo — „Vojo tra la jaroj“ — la aŭtoro skribas pri elstara esperantisto Belĉo Nikolov, eksrektoro de la Supera Ekonomia Instituto en Varna, kaj substrekas, ke li ankaŭ per Esperanto batalis por sia komunista idealo.

En ĵ. „Zvezda“ — Kjustendil (30. XI. 1968): artikolo „Kiam aperis la okulvitroj“, tradukita de G. Kaŝukeev el „La Praktiko“, eldonaĵo de UEA.

En ĵ. „Trojanski Glas“ — Trojan (4. XII. 1968): sub titolo „Al ni skribas esperantistoj el USSR, Pollando kaj Nederlando“ estas publikigitaj tradukoj de tri leteroj, en kiuj oni parolas pri Bulgario kaj urbo Trojan.

En ĵ. „Zarja na Komunizma“ — Loveĉ (5. XII. 1968): artikolo „Kun la ardo de Zamenhof“ — pri la agado de la esperantistoj en la Distrikto de Loveĉ — de Vasil Markov kaj Lalju Lalev.

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Vătka Najdenova (36-jara) instruistino, gara Elin Pelin, str. Spartak, blok 1.

Korekto de adreso: Violin Oljanov, Bojanski vodopad 241 E, Sofio. Oficadreso: direktoro de prespropagando, Stambolijski 11-a, tel: 87-35-70.

Pollando

Andrzej Figarski (19-jara studento) Chelm—Ljubelski, Trubakowska 71 m. 3 — dez. kor. kun ĉl., interesiĝas pri politiko, sporto, kulturo, kolektas bk, alumeetikedojn.

Sovetunio

Litova SSR, Pasvalys, 8-te n-la Esper. klaso, Brone Aukštikalniene — dez. kor. kun ĉl.

Ivanovo — centro, str. Puŝkin 1/14, k. 13, Vareŝin Leonid — dez. kor. kun bulgaroj.

Makarov Igorj (29-jara studento), str. Lejnevskaja 128, kv. 7, Ivanovo — 35 — dez. kor. kun ĉl.

Lit. SSR, Vilnius, str. Vikinto dom 15/11, kv. 1, Lavodnik Leo 13-jara knabo.

Lit. SSR, Vilnius-5, str. Lvovo dom 26, kv. 11, Curukov Kolja 13-jara knabo.

Lit. SSR, Vilnius-5, str. Lvovo dom 11, kv. 25, Busloviĉ Vadim 13-jara knabo.

Lit. SSR, Vilnius, str. Aluntos dom 8/5 kv. 3, Doroŝina Ljuda 14-jara knabino.

Lit. SSR, Vilnius-6, str. Lvovo dom 33, kv. 5, Jarmoloviĉ Lilja 14-jara knabino.

Lit. SSR, Vilnius, str. Liepos-21 dom 12, kv. 7, Ivenskaj Ira 15-jara knabino.

Lit. SSR, Vilnius, str. Stepo-Žuko dom 2/28, kv. 21, Blaženova Ira 15-jara knabino.

Lit. SSR, Vilnius, Ĵirmunu, dom 51, kv. 42, Baĥareva Vara 16-jara knabino.

Lit. SSR, Vilnius, Ĵirmunu, dom 83, kv. 30, Serdukova Larisa 16-jara knabino.

Lit. SSR, Vilnius, ul. Grejfenbergerisa dom 5/6, kv. 16, Balĉaŭskajte Jadja 16-jara knabino.

Lit. SSR, Vilnius, ul. Grejfenbergerisa dom 5, kv. 25, Kluĉenkova Galja 16-jara knabino.

Lit. SSR, Vilnius-5, str. Putno dom 19, kv. 32, Terehov Sergej 16-jara knabo.

Lit. SSR, Vilnius, ul. Dzerĵinski dom 162, kv. 58, Ivanova Ljuda 16-jara knabino.

Lit. SSR, Vilnius, str. Verkiu dom 39/7, kv. 3, Adamskij Mihail 16-jara knabo.